


Boletín[★]

de la Federación Española de Esperanto



Nº 305 - MARTO - ABRIL - 1992

Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Redaktoroj kaj kunlaborantoj:

Salvador Gumá Clavell
Miguel Fernández Martín
Vicente Hernández Llusera
Andrés Martín González
Luis Serrano Pérez
Miguel Gutiérrez Aduriz
Antonio Valén Fernández

ENHAVO

Ek al la laboro!	3
52a Hispana Kongreso	4
Ĝenerala Kunveno de HEP	4
Viglas la movado	5
Kihoto-92	8
Financaj raportoj	9
Pri la ĉapelitaj literoj	11
Apliko de strategia plano kontraŭ reformemuloj	12
Olé la Centra Oficejo	16
Fray Luis de León	17
Lingva angulo	21
Elvokante nian Lirikan Feston	22
Recenzoj	25
Fundación Esperanto kultura politiko	27
Deziraro korespondi	29

Kovrilo: Muzik-palaco de Valencio,
eventuala kongresejo de la UK-93.

Noto: Pri la enhavo de la artikoloj
respondeblas la aŭtoroj mem.

Centra Oficejo:

c/ Rodríguez de San Pedro, 13, 3º, p-7.
28015 MADRID
Telefono: (91) 446-80-79

Prezidanto:

Antonio Alonso Núñez
Apartado 714
E-15780 SANTIAGO DE COMPOSTELA
Telefono kaj fakso: (981) 59-80-05

Sekretario:

Manuel López Hernández
Apartado 369
41080 SEVILLA

Vicprezidanto:

Alberto Franco Ramirez

Vicsekretario:

Luis Gil Pérez

Kasisto:

José M^a Bernabeu Franco
Gral Primo de Rivera, 6
03360 CALLOSA DE SEGURA
Konto n^o 83100-272 de Hispana Esperanto
Federacio en Banco Español de Crédito en
Callosa de Segura (Alicante).

Ĉef-redaktoro de Boletín:

Antonio Marco Botella
Av. Compromiso de Caspe, 27-29, 9º C.
50002 ZARAGOZA

Libroservo de HEF:


Luis Hernández García
Apartado 119
47080 VALLADOLID

Fundación Esperanto:

Sekretario: Enrique Piquero
San Vicente de Paul, 1, 1º.
50001 ZARAGOZA

(HEJS) Junulara Sekcio:

Prezidanto: Iñaki Gauna
Domingo Beltran, 42, 4º D.
01012 GASTEIZ-VITORIA



EK AL LA LABORO!

Jen ni antaŭ la 52a HEF-kongreso: unuafoje hispana E-kongreso okazos en Merido. Tiu urbo, turisme vizitinda, estas pli ol interesa historie kaj arte. La kongresprogramo loge invitas al la partopreno, kaj garantias amuzon kaj distron. Ekster tiuj memeventaj kialoj, ni, hispanaj esperantistoj, havas kromajn motivojn por nepre partopreni en la Merida kongreso, nome, la Valencian UK-on por 1993. Kune kun la valenciaj responsuloj, ni devas finpretigi interesan programon por la Universala kongreso, kies ĝeneralaj linioj jam skizigis en la Madrida kunveno de la pasinta 29a de februaro. Nenion ni lasu al improvizo.

En la kongreso de Merido, tiel proksime de Portugalio kaj supozeble kun bona partopreno de portugaliaj samideanoj, ni devus fari nian eblon por starigi firmajn kaj definitivajn rilatojn kun portugaloj en komunaj laborprogramoj esperantistaj. Mi jam lanĉas la sugestojn pri portugaliaj-hispanaj programoj en la UK-93, pri Universitata Somerkurso en Santiago kaj pri aranĝo de Iberia Kongreso okazonta en Lisbono ne pli malfrue ol 1994.

Se mia voĉo havus ian influon, mi ne prokrastus alvokon al niaj samideanoj, por ke ili, ni, ne lasu la tutan aranĝon de la Somerkurso okazonta en 1993 en la Universitato de Santiago sub la nura zorgo kaj penado de la Prezidanto Alonso. Ĉiuj ni devas iamaniere kontribui en la tasko de tiu brila projekto jam proksima al sia realiĝo. Kaj la kongreso de Merido estas oportuna loko por esprimi nian helpon kaj kunlaboremon.

Gravas ankaŭ, ke niaj membroj decidiĝu pli fervore kunlabori kun la Patronaro de "Fundación Esperanto" en la interesa agadprogramo, kiun ĝi jam prezentis en nia revuo kaj plu klarigos en la kongreso de Merido: la gravaj celoj de "Fundación Esperanto" ne povas esti ignorataj de nia anaro.

Mi ja povus ankoraŭ indiki mil kaj unu pliajn motivojn por instigi vin partopreni en la Merida kongreso. Granda tasko atendas nin: Ek al la laboro!

La Redakcio

52^a Hispana Kongreso de Esperanto



La provizora programo publikigita en la numero 304 de **Boletín** (januaro-februaro ĉijara) iĝis definitiva, krom tri pliaj eroj kiuj ankoraŭ ne estas certigitaj.

En la kongreslibro aperos indiko de la horoj por ĉiuj programeroj.

La kongresejo estos **CASA DE LA CULTURA**, calle Moreno de Vargas, Mérida.

La akcepto al la kongresanoj okazos en la mateno de la jaŭdo, 30an de aprilo.

GENERALA KUNVENO DE HEF POR LA JARO 1992 OFICIALA ALVOKO

Obeante niajn statutojn, la estraro de HEF alvokas ĉiujn anojn al la Generala Kunveno por la jaro 1992.

- Dato kaj horo:** En sabato , 2an de majo, je la kvara posttagmeze.
Ejo: La kongresejo, **CASA DE LA CULTURA**, calle Moreno de Vargas, Mérida.
Temaro: Prezento, lego kaj, se ende, aprobo de la protokolo de la antaŭa ĝenerala Kunveno, HEF-kontoj, kontoj de libroservo, raporto de la estraro. Demandoj, petoj, proponoj.

En Madrido, la 29an de februaro 1992.

La Sekretario, Manuel López Hernández
La Prezidanto, Antonio Alonso Núñez



Seviljo. - Gesamideanoj Ana Manero kaj Miguel Fernández en Televido.

Invititaj de Televidkanalo "Tele-Sur" (Aŭtonomia Andaluza Televido) M. Fernández kaj Ana Manero prezentiĝis tra tiu televido en speciala programo pri Esperanto la 4an de pasinta Februaro.

En tute malstreĉa etoso niaj kolegoj respondis al la demandoj de la programvidanto pri la allogo de la lingvo, aktivado de la esperantistoj, atingoj dum unu jarcento de ekzistado de E., beletro kaj diversaj aliaj aspektoj kaj aspiroj aktualaj kaj estontaj pri nia Movado.

La programvidanto montris al la publiko du el la verkoj de Miguel Hernández kaj García Lorca tradukitaj de Miguel Fernández, kaj demandis pri la tradukproblemoj de tekstoj tiel malfacilaj. Belaj poemoj estis deklamataj de Ana kaj Miguel.

Aperis ankaŭ intervjuoj al junaj geesperantistoj kunvenintaj en Almonáster (Huelva), kies respondoj estis tre ŝatataj de la publiko.

En alia momento de la interesa programo aŭdiĝis fonaj sonoj melankoliaj de gitaro, kaj tute

spontane ŝprucis la demando, ĉu eblus aŭdi andaluzan kanzonon kantatan en Esperanto? Kompreneble, Miguel ne bezonis plian peton aŭ inciton, kaj kantis kaj kantis en nia dolĉa lingvo profunde impresante la aŭdovidajn spektantojn, kiuj ne volis vekigi el tiu agrabla kvazaŭ-songo, ĉar ne ĉiutage oni povas aŭdi andaluzajn kanzonojn en Esperanto.

Ana kaj Miguel, kiuj ne unufoje jam elmontris sian talenton kaj stilon deklamante poemojn aŭ kantante kanzonojn en E-o, denove sukcesis, ĉi-foje tra la populara televido.

La Redakcio de "Boletín" tutkore gratulas niajn ŝatatajn artistojn.

Ni atentigas niajn legantojn, ke se oni ricevas la koncernan subvencion de la aŭtoritatoj, niaj samideanoj Ana kaj Miguel prezentos muzikan-poezian programeron en la venonta 52 HEF-kongreso en Merido kune kun la koruso "Verda Stelo" kaj sub la taktobastono de ĝia direktoro Petro Vilarroig.

Nova Katalogo de la Libro-Servo de HEF.

Nia Libro-Servo jam preparas Novan Katalogon alfabeto ordigitan

laŭ temoj, kiu prezentos librojn kaj esperantaĵojn mendeblajn al tiu servo de la Federacio.

La kutimaj klientoj de Libro-Servo ricevos la Katalogon tuj post ĝia pretigo. La legantoj de "Boletín" dezirantaj ĝin ricevi povas mendi al jena adreso: Libro-Servo de H.E.F.; Apartado 119. 47080-VALLADOLID.

Interesa Ekskurso al Hungario.

Post la Universala Kongreso en Vieno, H.E.A. organizas oktagon ekskurson per aŭtobuso rekte de Vieno al Bratislavo (Ĉekoslovakio) kaj al la plej ĉarmaj regionoj kaj tipaj urboj de Hungario: Budapeŝto, Gyor, Szeged, Kőszeg, Szombathely k.a. Kuracbanado, vingustumado, naĝado ktp. Tranoktado en hoteloj kun trifoja manĝado kaj reveturo al Vieno. Prezo ĉ. 580 guldenoj. Aliĝdato 1992-03-15. Informoj: H.E.A. 1368-Budapest. Pf. 193. Hungario.

Denove "Internacia Semajno" en Montpellier.

La Kultura Esperanto-Centro de tiu urbo anoncas, ke ĝi denove organizos dum la venonta somero "Internacian Semajnon", okazonta ĉe mediteranea marbordo, en havenurbo Sète, 30 km. okcidente de Montpellier, en bela parko apud la maro, de la 12a ĝis la 19a de Septembro 1992.

Ni proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto. Vi ja trovos vere internacian etoson. Ankaŭ...banadon, ekskursojn, vesperkunvenojn kaj bonan manĝon.

Tre modesta restadkosto. Ebleco tendumi. Informoj: Centre Culturel Esperanto. 5, Rue Docteur Roux. 3400-Montpellier. Francio.

SENPAGE!

30 gejunuloj povos tranokti tute senpage en Merido dum la venonta Hispana Kongreso de Esperanto.

Ĉiu interesito tuj kontaktu S-ron Cabezas (tel: 924 - 37 20 51), kaj informu lin pri sia deziro partopreni la kongreson, kaj ĝui la oferton.

Aŭtobuslinio kaj Kampadejo.

La OKK de Merido anoncas la eblecon uzi linion de aŭtobusoj de Madrido al Merido (ĉiutage krom sabate). La entrepreno situas en la placo Conde de Casal de Madrido.

Oni ankaŭ sciigas pri la ekzisto de kampadejo je du kilometroj de Merido, kie oni povos tendumi.

Livero de la premio "KLARA SILBERNIK" 1992.-

Kadre de la 52-a Hispana Kongreso de Esperanto, okazonta en Merido, de la 30-a de Aprilo ĝis la 3-a de Majo 1992, la nunjara premio "Klara Silbernik" estos liverata al s-ino Maria Paz Rocés, edzino de la plurfaceta Esperanto-aktivulo el Gijón, s-ano Santiago Mulas Gallego, entuziasma partoprenanto en ĉiuj niaj kongresoj.

Dua esperantista rendevuo.-

Ĝi okazos en la kataluna urbo Vila-rodona (Tarragona), la 7-an de Junio nunjara. Kadre de tiu evento estos inaŭgurata strato kun la nomo *ESPERANTO*. Pliajn informojn petu al la KAE-prezidanto s-ro José M^a Galofré Domingo; C/Canonge Joncar, 122.D. 08208-SABADELL.

Pri la divenludo de "BOLETIN".-

Laŭ iniciato de nia kunlaboranto S-ro Bernard Golden, ni prezentis tiun divenludon en la numero 303 de nia revuo.

Partoprenis 12 konkursantoj, el kiuj dek kun eraroj en la respondoj. Nur du el ili plene trafis: s-anoj Nicolas Muñiz Alonso, de Avilés, kaj Juan Antonio Giménez Garcia, de Valencio.

Oni lotumis la premion inter ambaŭ kaj la sorto favoris al s-ro Juan

Antonio Giménez, kiun "Fundación Esperanto" oportune sendos la premion: la libron *DON KIĤOTO*, de Cervantes.

Nian gratulon al s-anoj Giménez kaj Muñiz, kaj nian dankon al ĉiuj partoprenantoj. Dankon!

Tristiga Nekrologo.

S-ano Eusebi Artigas i Buxeda forpasis 94-jara en Sabadell.

Li konatiĝis kun Esperanto en la jaro 1905a. En la jaro 1912a li ekloĝis en Sabadell, kie li ekrilatis kun la loka esperanta agado. En la jaro 1914a li fariĝis aktiva membro de la loka Grupo, en kiu li baldaŭ instruis la lingvon kaj estis elektita Prezidanto. Li redaktis dum multaj jaroj la gazeton "La Semisto".

Post la unua mondmilito, li prizorgis la venigon de grupo de aŭstraj infanoj, kiujn tuj adoptis lokaj familioj.

Li partoprenis multajn Esperantajn Kongresojn naciajn kaj en la j. 1936a la Internacian en Vieno.

Esperanto perdis ekzemplodonan samideanon, kaj ni esprimas al liaj familianoj nian sinceran kondolencon.

La Redakcio.

LIBROSERVO DE HEF

ofertas al la hispanaj esperantistoj
abundon da libroj, diskoj, kasedoj,
vidbendoj, glumarkoj, ktp.
Petu senpagan ekzempleron de ĝia
Katalogo.

★ HEF: BONAJ SERVOJ ★

Kiĥoto-92

LA KAMPANJO

FUNDACIÓN ESPERANTO affrontas novan defion kaj organizas kampanjon por ke, en ĉiu publika biblioteko de Hispanio, ekzistu almenaŭ unu ekzemplero de la majstra verko Don Kiĥoto, en Esperanto.

DAŬRO DE LA KAMPANJO

Ĉi kampanjo daŭros ĝis la fino de novembro de 1992. Post tiu dato, FUNDACIÓN ESPERANTO detale informos pri la donaco la Ministerion pri Kulturo kaj la landan gazetaron, kaj en la 15-a de decembro (Zamenhof-tago) transdonos la kompletan donacon al la elektitaj bibliotekoj, pere de la kunlaborantaj grupoj kaj asocioj.

KAJ LA MONO... AL LA MOVADO!

FUNDACIÓN ESPERANTO destinas la enspezitan monsumon por stabiligi kaj kresko de la hispana Esperanto-movado.
Telefonnumero kun aŭtomata respondilo por rapida kontakto: 942-26-00-58.

Kunveno en Madrido

La 29an de februaro kunvenis en Madrida Esperanto Liceo la LKK de la Universala Kongreso en Valencio kune kun pluraj esperantistoj de la tuta lando, ĉefe por trakti la preparon de tiu grava evento.

La vesperon oni profitis por studado de aliaj temoj, kaj por vizito al la nov-aspekta Centra Oficejo de HEF.

Esperanto en ĉiu publika biblioteko danke al Don Quijote

ĈIU POVAS KUNLABORI

Ĉiu esperanta grupo, aŭ eĉ unuopa esperantisto, povas kunlabori jen per akiro de unu ekzemplero por la publika biblioteko de sia urbo aŭ vilaĝo, jen per laŭvola donaco tiucele.

ANKAŬ FUNDACIÓN ESPERANTO KONTRIBUOS

Unu ekzemplero de Don Kiĥoto kostas nun 4.000 ptojn, sed FUNDACIÓN ESPERANTO speciale kunlaboros en la kampanjo subvencianta per 1.000 ptoj ĉiun donacotan volumon.

Informu pri via deziro kunlabori al:
Fundación Esperanto / San Vicente Paul 1, 1º
/ 50001 Zaragoza.

ENSPEZOJ KAJ ELSPEZOJ DE LIBROSERVO

ENSPEZOJ

Antaŭa saldo	52.742
Vendado de libroj	1.339.770
Interzonoj el la konto ĉe Poŝta kaso	187
Diversaj abonoj por 1992	3.500
Jar-enspezoj	<u>1.343.457</u>

ENTUTE

1.396.199

ELSPZOJ

Aĉetado de libroj	1.007.721
Oficeja ilaro	39.130
Poŝto (poŝtmarkoj, O.I.C)	52.400
Transportado de libroj	67.925
Bankaj elspezoj	13.324
Diversaj abonoj por 1992	3.950
Por la HEF-Bulteno	25.000
Jar-elspezoj	1.209.450
Saldo al nova konto	<u>186.749</u>

ENTUTE

1.396.199

Valladolid 31an de Decembro de 1991

La prezidanto
Antonio Alonso

La libroservanto
Luis Hernández García

Ĉefdelegito de UEA

En la januara numero de Boletín
ensteliĝis eraro rilate al la
kontonumero de la Ĉefdelegito de
U.E.A. Bonvolu noti, ke ĝi estas la
jena: 0354.85.31 de Caja Postal.

Boletín

mi amas vin

FINANCA RAPORTO DE HEF

Enspezoj

Favora saldo laŭ la antaŭa bilanco (6-6-91)	211.320
El ordinaraĵ kotizoj krom 4.759 ptoj de rentumo	81.870
Donaco de Maria Pi Maynar	25.000
Trinitat García (Grupo "Jozefo Anglés" de San Cugat)	10.000
Donaco de Montserrat Cabrafiga	300
Redono de prunto al "Fundación Esperanto"	100.000
Vendo de Don kiŭoto al Jesús de las Heras	3.500

Jarenspezoj 220.670

ENTUTE 431.990

Elspezoj

Pago de Boletín 301, pere de A. Marco Botella	29.514
Banko-ĉeko (Antonio Alonso)	25.000
Banko-ordono (Antonio Alonso)	47.000
Kosto de la bank-ordono	330
Pago de Boletín 302, pere de A. Marco Botella	60.000
Pago de Boletín 303, pere de A. Marco Botella	54.672
Sekretariaĵ elspezoj (M. Lopez Hernández)	11.121
Aliaĵ elspezoj (J. M. Bernabéu)	3.500

Jar-elspezoj 231.137

Saldo favora 200.853

Callosa de Segura 31an de decembro de 1991.

La prezidanto
Antonio Alonso

La kasisto
José Maria Bernabéu

PRI LA ĈAPELITAJ LITEROJ

La literoj kun supersigno estas grava malfacilaĵo por la disvastigo de Esperanto, ĉar ili ne estas troveblaj en la klavaro de la diversaj iloj bezonataj en la moderna vivo; kaj estas struta politiko malatenti tiajn malfacilaĵojn. Tial mi proponas anstataŭigi ilin per aliaj ĝis nun ne uzataj latinaj literoj, kiam tio estas bezonata. Mi uzos la novan sistemon por montri ĝin praktike. Jen mia propono:

La senĉapeligitan alfabeton konsistigas el 28 literoj: A, B, C, Ch, D, E, F, G, H, I, J, K, L, M, N, O, P, Q, R, S, Sh, T, U, V, W, X, Y, Z.

La antaŭaj senĉapeligitaj literoj a,b,c,d,e,f,g,h,i,j,k,l,m,n,o,p,r,s,t,u,v,z, restas samaj kiel antaŭe, sen iu ajn shanyo.

La novajn literojn oni uzas law la seqanta maniero: Ch= ĉ; Sh= ŝ; W= ŭ; X= ks kaj kz; Y= ĝ kaj ĵ; chi tie estas bezonata la neologismo "adyo" por eviti la koincidon kun la sufiko "ay" (aj) en kunmetitaj vortoj kiel "vinadyo" (vinaĝo, aĝo de la vino) kaj "vinayo" (vinaĵo, faritaĵo el vino). Y oni prononcas kiel ĵ.

Q= kv. Tiu chi litero anstatawas la paron kv, kiu estas rusigo de la latina "qu" kaj iĝas nepronebla por la plej granda parto de la homoj, speciale komence de vorto, kiel en "kvar", "kvin", "kvakero", kaj multaj aliaj. Ekzemplo: Kvadrato estas: latine quadratura, portugale quadratura, itale quadratura, hispane cuadratura (legu kŭadratura), france quadrature, angle quadrature, germane quadratur, ruse kvadratura kaj esperante kvadrato.

Chiu, kiu partoprenis en esperanta kongreso, povis awdi prononci la vorton "kvar" per tre diversaj sonoj, kiaj "ekvar", "kavar", "kuvar", "kivar", sed la plej ofte uzata estas la proponita "kŭar". La instruistoj bone scias pri tio. En la lernolibro verkita de nia kara forpasinta Pedro Nuez, "unu", "du" kaj "tri", aperas en la dua leciono, sed "kvar" kaj "kvin" aperas en posta leciono por ne fortimigi la komencantojn.

La litero ĥ estas anstatawigita per la litero K, kiel estas yam kutimo, escepte en "ĥoro", kiun anstataŭas la neologismo "koruso".

Tiu chi alfabeto havas nenian malfacilayon por esti uzata en yurnaloj, presejoj, radiotelegrafio, teletajpiloj kaj komputiloj. Per yi, kiam vi vidas latinan

klavaron sidiyu kaj skribu en Esperanto! Chiaj komputiloj, chiaj skribmashinoj estas taŭgaj!.

Juan Navareño

Noto.- Tiu ĉi propono plilongigas la liston de alfabetreformoj proponataj de post la apero de Esperanto. Estas notinde, ke ĝi -ankaŭ ĝi!- malkongruas kun la aliaj. Alfabeto havas pli profundajn radikojn ol oni supozas, kaj nur la Akademio povus pridecidi.

La Redakcio.



APLIKO DE STRATEGIA PLANO KONTRAŬ REFORMEMULOJ

"En vino vero, en satiro severo"

En la pasintaj jaroj mi ricevis informojn pri pluraj projektoj celantaj plibonigi, t.e. reformi, Esperanton. Ĉiu estas pli bizara ol la alia. Mi jam konstatis, ke ne estas eble bremsi la fervoran agadon de ĝisostaj reformistoj per objektivaj faktoj kaj raciaj

argumentoj, do mi ne plu sekvas tiun vojon, kiu estas tempo- kaj fortodisipa. Eĉ negativa respondo neniel efikas, ĉar reformemuloj estas denaskaj mensmasokistoj kaj, kiam ili sentas, ke oni volas forpuŝi ilin, ili pliintensigas siajn klopodojn konvinki oponentojn. Sekve, neniam estas fino de tiu cerbtorporiga diskutado.

Mi sukcesis evoluigi fiaskimunan Strategian Planon, kiu donas finofaran baton al tiuj fantaziuloj, kiuj senĉese kolportas siajn reformprojektojn ie, tie kaj ĉie en Esperantujo. Mi tutsimple aliĝas al ili!. Jes ja, mi informas ilin, ke mi opinias, ke ili estas sur la ĝusta vojo por forigi difektojn en Esperanto; tamen, zorga trastudo de iliaj proponoj montras, ke la modifoj enkondukotaj en la lingvon estas vere nur supraĵaj. Se la celo estas reformi Esperanton oni devas plenumi tiun taskon radikale, unu fojon por ĉiam, por ke post la dua jarcento de disvolviĝo de la lingvo, ne estos necese ankoraŭfoje lanĉi kampanjon por "plibonigi" la jam plibonigitan lingvon.

Post tiuj enkondukaj rimarkoj por kuraĝigi la reformemulojn, mi prezentas miajn proprajn proponojn, kiuj estas tiel fundament-skuaj, ke se ili estus akceptitaj, la lingvo estus tiel draste kaj vaste transformita, ke eĉ la reformistoj mem ne plu rekonus ĝin kiel Esperanton. Per tiu artifiko la zamenhofa Esperanto ne plu estus endanĝerigita.

Ĝuste tiel mi agis rilate proponon venintan de esperantisto el Madrido, kiu volas ŝanĝi la Esperantan alfabeton per elimino de la supersignoj. Post ekzameno de lia nova alfabeto mi verkis la raporton, kiu sekvas.

Proponoj por plibonigi la novan alfabeton de Juan Navareño Fernández.-

Sur unu flanko de cirkulera folio titolita "Pri la ĉapelitaj literoj", dissendita en oktobro, 1991, Juan Navareño Fernández el Madrido, Hispanio, informas pri sia reformita versio de la alfabeto de Esperanto. Bedaŭrinde, Navareño ne sufiĉe profunde pravigas kaj motivas siajn klopodojn, do la nova ortografia sistemo riskas fiaski same kiel okazis al ĉiuj aliaj reformprojektoj ekde la estiĝo de Esperanto, sen iu ajn escepto. Ekzemple, li ne bazas sian elekton de la 28 literoj de la reformita alfabeto sur teoriaj kaj komparaj fonetikaj konsideroj. Tiu ĉi diletanteca aliro al la problemo de kreo de alfabeto por internacia komunikado estas karakteriza de preskaŭ ĉiuj planlingvaj projektoj kaj la provoj plibonigi ilin.

Estas evidente, ke Navareño estas obsedata de la ses supersignitaj literoj de la Esperanta alfabeto, sed por elimini ilin li elcerbigis eĉ pli kaosan alfabeton. Aktuale, objektado pri la malfacileco presi aŭ komputeri tekstojn, kies alfabetoj posedas diakritajn signojn, estas sensenca. La obstakloj, kiuj ekzistis ĉe presmaŝinoj kaj tajpiloj, estis forigitaj antaŭ jardekoj, kaj modernaj komputeroj kaj programoj kapablas krei karakterojn por la plej ekzotaj alfabetoj. Dum olduloj de pasintaj generacioj ankoraŭ nun postulas, ke oni ŝanĝu la lingvon por konformigi ĝin al maŝinoj, junaj fakuloj, kiuj marŝas laŭtakte kun la etoso de la nuntempo, jam modifis la aparatojn, por ke ili servu al la homo kaj ne kontraŭe.

Profesiaj lingvistoj kaj fonetikistoj jam esploris la demandojn pri optimuma aŭ ideala sonsistemo por internacia lingvo. Kiu volas modifi la alfabeton de Esperanto aŭ iu ajn alia planlingvo, devas unue trastudi la rezultojn de antaŭaj esploristoj kaj apliki la principojn, kiujn ili trovis plej utilaj. Nur tiel estas eble fari science valoran kontribuadon al la evoluigo de la Esperanta fonetiko kaj ortografio.

Komparo de kvar alfabetoj por internacia lingvo.-

La proponita nova alfabeto de Juan Navareño konsistas el la sekvaj 28 literoj.

plosivoj: p, b, t, d, k, g.

afrikatoj: c, ch, (= ĉ), y (= ĝ).

frikativoj: f, v, s, z, sh (= ŝ), y (= ĵ), h.

nazaloj: m, n.

likvidoj: l, r.

duonvokaloj: j, w (= ŭ)

vokaloj: i, e, a, o, u.

anomalioj: q (= kv), x (= ks, kz).

Navareño eliminis "ĥ", kiun li anstataŭigis per "k". La plej granda difekto de la alfabeto de Navareño estas, ke ĝi ne estas fonetika, t.e. unu litero por ĉiu sono, unu sono por ĉiu litero. La digramoj "ch" kaj "sh" estas "ĉ" respektive "ŝ", "y" havas du prononcojn, "ĝ" kaj "ĵ", same kiel "x", kiu prononciĝas kiel "ks" kaj "kz". La litero "q" reprezentas du apartajn sonojn "kv", kiu kelkfoje estas prononcata kiel "kü". Kun la escepto de tiu ĉi konsonant-grupiĝo, Navareño ne pripraktas la demandon pri malfacileco de prononco de sonoj por homoj, kies gepatra lingvo havas fonetikan sistemon tre diferencon disde tiu de Esperanto, kaj li preteratentas ankaŭ la eblon de miskompreno de vortoj pro simile prononcataj sonoj, ekzemple tiuj, kiuj distingiĝas nur surbaze de voĉeco (p/b, t/d, k/g ks.).

Estas eble objektive mezuri la praktikecon de la nova alfabeto de Navareño por internacia komunikado, se oni komparas lian sistemon kun tri aliaj ellaboritaj de lingvistoj kun la celo akiri optimuman aŭ idealan sonsistemon por parolantoj de plej diversaj lingvoj. Tri lingvistoj, Sapir, Trubetzkoy kaj White, kreis reduktitajn sonsistemojn, konsistantajn el facile distingeblaj kaj prononceblaj sonoj.

	Sapir.	Trubetzkoy.	White
plosivoj:	p, t, k	p, t, k	p, t, k
frikativoj:	s, v.	s	v
nazaloj:	m, n.	m, n.	m, n.
likvidoj:	l	l	l
duonvokaloj:		w, j.	
vokaloj:	i, a, u.	i, e, a, o, u.	i, e, θ, a, o, u.
	11 sonoj	14 sonoj	13 sonoj

La simileco de ĉiuj tri sonsistemoj estas okulfrapa. Neniu havas afrikatojn kaj voĉajn plozivojn. Se oni kunmetas la sonojn de ĉiuj tri sistemoj (kun la escepto de la sesa vokalo de White), la rezulto estas jena 15-litera alfabeto, reduktita je proks. 50% kompare kun la nova alfabeto de Navareño.

plzivoj:	p, t, k.	likvidoj:	l.
frikativoj:	s, v.	duonvokaloj:	w, j.
nazaloj:	m, n.	vokaloj:	i, e, a, o, u.

Estas konsilinde, ke Navareño forlasu sian novan alfabeton kaj dediĉu sian atenton al la pli science disvolvita Sapir-Trubetzkoy-White alfabeto (STW-alfabeto).

Transkribo de "La Espero" per la STW-alfabeto.-

Por ilustrati kiel la reduktita STW-alfabeto funkcias, jen transkribo de la unua strofo de la Esperanta himno "La Espero".

La Espelo.

En la monton venis nova sento,
Tia la monto ilas volta voko;
Pel vlukiloj te vatsila vento
Nun te loko vluku tsi al loko.

La fonetike plej similaj sonoj en la STW-alfabeto estas substituitaj al la sonoj en Esperanto, kiuj mankas (d, r, f, g, ĝ), kaj "ts" donas la sonon de "c". Malgraŭ tiuj diferencoj, la teksto estas facile komprenebla kaj sonas kvazaŭ dialekto de la normlingva Esperanto.

La sekva paŝo kondukas al reformo de la leksiko de Esperanto por elimini homonimojn rezultantajn de la fonetikaj modifoj. En la ĉi-supra teksto estas necese ŝanĝi nur kvar vortojn pro homonimeca kolizio. Ĉar "mondo" fariĝis "monto", la vorto por "monto" estu "kilimo" (sŭahila). Por ne modifi la sufikson "-il", la verbo "ili" ("iri") estu "meni" (hungara). Ĉar la radiko "volt-" estas elektra termino, la nova radiko "stark-" (germana) anstataŭu "fort-". Por diferencigi la novan prepozicion "pel-" disde la verba radiko "pel-", tiu ĉi fariĝu "kovmak-" (turka). Per tiu ĉi procedo la nova alfabeto naskos novan lingvon, eĉ pli internacian ol la tradicia Esperanto!

Konkludo

En la pasinteco planlingvistoj multe pli kompetentaj ol Navareño publikigis projektojn por plibonigi Esperanton. Kiu konas la historion de la planlingvistiko, ja scias la sorton, kiu trafis tiujn provojn: neeviteble kaj senespere ili jam de

longe malaperis en la abismon de forgeso. Ankaŭ nun la faŭko de la profundego estas aperta por engluti novajn planlingvajn fuŝprojektojn. La sola ŝanco savi la novan alfabeton de Navareño estas prezenti ĝin en la reduktita formo rekomendita en tiu ĉi raporto. Ĉar Navareño nun agas kiel unuopulo, liaj fortostreĉoj ne havos grandan efikon. Estas necese, ke li varbu apogantojn, konsistantajn el fakuloj pri lingvoj kaj fonetiko, planlingvistoj kaj ankaŭ renegataj eks-esperantistoj. Cetere, por informi la publikon pri la reformita nova alfabeto kaj aliaj plibonigoj de Esperanto, nepre bezonata estas regule aperanta periodaĵo, eĉ se nur en la formo de modesta bulteno, kies celo estas konvinki skeptikulojn pri la seriozeco de la afero. Fine, Navareño enkapigu, ke la tempo iras kontraŭ li, do li devas labori intense kaj rapide. Kio okazus al lia nova alfabeto, se Esperanto en la nuna stato estus oficiale agnoskita en la proksima estonteco?

Bernard GOLDEN

Konsultitaj verkoj:

- Edward Sapir kaj aliaj. Memorandum zun Problem einer internationalen Hilfssprache (Memorando pri la problemo de internacia helpilingvo). Pĝ. 133-147 en: Plansprachen. Beiträge zur Interlinguistik; Darmstadt: Wissenschaftliche Buchgesellschaft; 1976.
- N.S. TRUBETZKOY. Wie soll das Lautsystem einer künstlichen internationalen Hilfssprach beschaffen sein? (Kiel estu akirita la sonsistemo de artefarita internacia helpilingvo?) Pĝ. 198-216 en: Plansprachen. Beiträge zur Interlinguistik. Darmstadt: Wissenschaftliche Buchgesellschaft; 1976.
- Tibor VASKO. Ĉu ideala sonsistemo? (Analizmetodoj por esplori optimecon de sonsistemo) Esperantologiaj Kajeroj. 1976 (1): 15-43. (Tiu ĉi artikolo enhavas valoran bibliografion kaj glosaron de fonetikaj terminoj).
- John C. WELLS. -Lingvistikaj aspektoj de Esperanto-. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio; 1973.
- Ralph Gardner WHITE. Towards the construction of a Lingua Humana. (Al la konstruo de homara lingvo). "Current Anthropology". 1972 februaro; 13 (1): 113-123.

Olé la Centra Oficejo!

Finfine, la 29an de februaro la respondeculoj de la Centra Oficejo de HEF en Madrido, Marcos Cruz, Gonzalez Aboín kaj Jorge Camacho, oficiale prezentis la renovigitan ejon al la HEF-estraro. Ĉi etan, sed signifan eventon ĉeestis pluraj esperantistoj avidaj koni la novan aspekton de la lokalo.

Pere de diapozitivoj, Marcos Cruz montris la diversajn paŝojn faritajn en la restaŭrado. Jen brava laboro de eta grupo de madridanoj, kiuj laŭlonge de pluraj monatoj devis purigi plankojn, translokigi ruinajn meblojn, farbi murojn, ripari seĝojn, ktp. Eble kelkajn ŝoketos la blanko de la muroj kontraste kun la nigro de la pordoj kaj la flavo de la seĝoj, al tiuj nur unu devizon: for la mucidon!

Certe, iom post iom, paŝon post paŝo, HEF daŭre metas la necesajn trabaĵojn por konstrui al si racian strukturon surbaze de sia plej solida havaĵo: LA CENTRA OFICEJO.

FRAY LUIS DE LEÓN (1527-1591)



Du gigantoj de la hispana liriko forpasis samjare: Sankta Johano de la Kruco, kiun ni jam prikomentis en pasinta numero de "Boletín", kaj Fray Luis de León, ne nur poeto, sed ankaŭ katedra profesoro, verkisto kaj filologo. Lia prozo simpla, belstila, klara kaj profunde lirika atestas lin kiel la plej fidelan reprezentanton de la reala signifo de la hispana renesanco. Neniu tiel sciis kunfandi la kulturajn fluojn konverĝintajn en lia epoko, nome, la klasika heredo, la itala influo, la hispana tradicia spirito kaj la profunda religia mesaĝo de la pasinteco. Liaj platonaj ideoj

devenas de la klasika mondo; lia koncepto pri mondharmonio, rekte de Pitagoro. Li lernis ami la naturon kaj la izolecon de liaj idealaj modeloj Vergilio kaj Horacio. Fray Luis komprenis tuj la valoron de la biblia poezio, kaj li sendiskute estas unu el la plej elstaraj hebreistoj de sia epoko.

Lia poezio, tiel altvalora kiel lia prozo, senorname elegantas. Lia inspiro ne fontas el la tuja realo, sed el la beleco de la naturo, kiu kondukas lin emfazi la ideon pri eterneco. Fray Luis kristianigis la klasikajn ilojn beletrajn laŭ la religia spirito de la renesanco.

Ankoraŭ tre juna, li gajnis la katedron pri Teologio en la Salamanka Universitato konkure kun la dominikanoj, kiuj neniam pardonis lian triumfon. Fray Luis de León uzis la latinan lingvon por oficialaĵoj, la kastilian por poezio kaj aliajn lingvojn (itala, hebrea, kaldea) por studi. Tio ebligis lin esplori la

internan signifon de la Sanktaj Skriboj sub diversaj aspektoj kaj traduki kastilien "La Kanto de la Kantoj" kun komentoj. Tial li estis enkarcerigita kvin jarojn, akuzita de simpatio al la judaro.

Lia tradukemo ankaŭ trafis "La Bukolikoj" de Vergilio, "La Odoj" de Horacio kaj "La Psalmoj" de David. Li verkis originale interesajn librojn; ni citu "La perfekta edzino" (trad. al Esperanto de A. Jiménez Loira), "Nomoj de Kristo", ktp.

Li verkis originale ankaŭ belajn poemojn: "Profetaĵoj al rivero Tajo", "Izola vivo" (trad. al Esperanto de F. de Diego), odojn "Al Salinas", "Al Filipino", kaj aliajn. Jen elstara poemo lia, kiun ni provis traduki:

Serena Nokto

I

Ĉe l' vido de l' ĉielo,
de lumoj multenombraj ornamita,
rigardas mi al tero
dumnokte nigre frida
en dormo kaj forgeso infinita.

II

Ĉagreno, am' kaj tristo
anksion vekas, mia koro varmas;
l' okuloj sen rezisto
fariĝas font' kaj larmas,
kaj la ĉielon laŭde mi proklamas.

III

Loĝejo grandioza!
Elstara templ' de plaĉ' kaj klar-kulmino,
l' anim' ĉe ĝi ripoza,
pro kia trompfascino
restadas en ĉi ter-prizon' ĝis fino?

IV

Ho, kia misdecido
pri ver' modifas la senduban sencon
kaj pri la dia fido

konjektas falsan penson
sekvante ŝajnan veron aŭ tendencon?

V

Liveras sin al revo
la homo, sed pri si mem ne atentas,
kaj lanta paŝ' sen strebo
turnas ĉiel', silentas,
lin rabas vivo, kiu ne aŭtentas.

VI

Vekiĝu ho, mortonto!
Rigardu bone en vin mem, ho, homoj!
I' animoj el ĉi mondo
faritaj el bondonoj
ĉu vere povos vivi laŭ fantomoj?

VII

Ha, levu hom' la vidon
al tiu ĉi eterna brila sfero!
Ĉu trompos vin la fido
al flata viv' sur tero
kun ties tim' kaj ĝia plen-espero?

VIII

Ĉu ne malsprita tero
estas nur unu el la punktoj brumaj,
ne atentinda ero
kompare al resumaj
pase', futur' kaj nun' eterno-lumaj?

IX

Kiu ne tion vidas
kaj la mizeron de la ter' valoras,
ne ĝemas, ne plu vidas,
ne rompas kion gloras
el bonoj kiuj la anim' trezoras?

X

Kontenton oni spiras,

ĉi tie regas paco por ĉiamo,
pri ĝi ni ja sopiras;
sur alta seĝ' de l' Amo
ĝi sidas en sanktega glor' kaj famo.

XI

Enorma bel-prezenco
montriĝas tie ĉi en sia helo,
klarega lumpotenco
en sia tuta belo
printemp' eterne floras en ĉielo.

XII

Ho, belaj kampoj veraj!
ho, freŝaj verdpaŝtejoj bonodoraj!
riĉhavaj ŝaktoj teraj,
bienoj tutvaloraj
kaj valoj fruktodonaj brilkoloraj!

Fray Luis de León verkis multajn el siaj poemoj sub la metrika formo nomata "liro" (strofo kvinversa: tri sepsilaboj kaj du dekonusilaboj), kiun mi respektis en la traduko. Versoj pensemaj kaj pensigaj kun profundaj konceptoj metafizikaj, gravaj rimarkoj filozofiaj, ĉarmaj metaforoj. Tamen ĉion ĉi li esprimas per tute simpla lingvo.

Fray Luis estas unu el la plej singularaj kaj admirindaj poetoj de la hispana literaturo, kaj ni, poezi-amantoj, ne povis preterlasi la datrevenon de lia forpaso.

Antonio Marco Botella

H E F

anuncia su
Cuenta Buena

Válida para toda España.
Sin transferencias ni costos adicionales.
nº 14.011.966 de Caja Postal.
Llegar ingresar y marchar.
¡Utilízala!

Lingva



Angulo

Prilingva rezonado tra diferenca lenso

Reage al la aspektisma ekzemplo, aperinta en "Recenza Angulo" de la lastnumera "Boletín" de novembro-decembro 1991, nome, ke "Li instruis en lernejo, el kiu li estis elpelita", mi dirus, ke ĝi estas malĝusta, ĉar la esprimo "Li instruis" (=Li estis instruanta) estas posttempa al "li estis elpelita" (=oni estis elpelinta lin) kaj estas evidente, ke instruisto "elpelita" el lernejo ne povas tie plu instrui. Mi forte dubas, ĉu iu tempisto iam proponis formon, kia: "Li instruis en lernejo, el kiu (poste!) li estis forpelata", sen la interparenteza adverbo "poste".

Same miskonstruita, kaj krome kontraŭdira, estas jena itisma ekzemplo: "La ne-vestita infano estis vestita", kiun esprimmaniero eble iu aspektisto konsideros senriproĉa. Tiurilate mi demandas, ĉu infano ne-vestita tamen estis vestita?. Ŝajnas, ke la ĝusta formo nome estas: "La ne-vestita infano estis vestata", en kiu frazo la kopula verbo estis, kun la participo vestata, klare indikas plenumon de ago en la pasinteco.

Cetere, la Akademio de Esperanto en sia rezolucio n-ro 8 pri la participoj (vidu Heroldon de Esperanto n-ro 6-1825- de aprilo 1990) pragmate rekonas kaj informas, kune kun propono de listo pri ŝtatnomoj kun ujo/io, ke "la uzado de la participoj montras la eblecon de du interpretaj teorioj same logikaj", nome tiu tempisma (=atisma), bazanta sin sur la sesa Fundamenta Regulo de la Gramatiko de D-ro Zamenhof, kiu eksklude parolas pri tempoj, sed ne pri aspektoj; kaj la t.n. itisma (=aspektisma), inventita de prof. Waringhien, sin bazanta sur la ne ĉiam konsekvenca aplikado de la participoj fare de la Majstro.

Konklude, ambaŭ teorioj estas respektindaj, ĉar de longe kunvivantaj en la Esperanto-Movado, same kiel tio okazas ĉe la landnomaj finajoj ujo/io. Tamen, estas dezirinde, ke kun la tempo triumfu la plej logika, laŭ-Fundamenta alternativo. Tion esperas

V. Hernández Llusera

Noto al la supra artikolo.

La frazo "Li instruis en lernejo, el kiu li estis elpelita" kun aliaj "Paradoksaj Ekzemploj" estis akuŝita de T.Yung antaŭ dudek kvin jaroj. Ĉar jam tiam mi draŝis ilin en "Boletín", mi nun ne redraŝos ilin. Same "paradoksa" estas "La infano kiu ne estis vestita, estis vestita". (Komparu: La nematura pomo, estis matura). Estas naive aŭ malice formi gramatike lamajn frazojn por pruvi, ke la prezenco (as) inkludas finitecon, kontraŭ la realaj faktoj kaj ankaŭ kontraŭ la konsekvenca uzado de Zamenhof.

Salvador Gumá


Elvokante nian Lirikan Feston.

Hodiaŭ Abel MONTAGUT

Venas en la vico de nia elvoko unu el la plej belaj poemoj de nia Lirika Festo, nome, la "Poemo de Utnoa" de Abel Montagut. Miguel Fernández, direktoro de la Festo, diris bele kaj trafe:

"Kiu kuraĝus nuntempe starigi la ĝustan limon inter epiko kaj liriko? Ĉiam pli la literaturaj ĝenroj interplektiĝas donante foje kiel rezulton artaĵon plej raran, kia la originala sepkanta verko "Poemo de Utnoa".

"Per homereska, jen kor-karesa, jen impona stilo, la kataluno Abel Montagut majstre prezentas al ni aktualigita la biblian miton de Noa kaj la diluvo laŭ sciencfikciaj kleoj: la gobanoj, superevoluintaj homoj el detruita astro en fora sunsistemo vagas tra la kosmo. Trafinte la teron, ili observas la konduton de ties logantoj kaj hezitas, ĉu tiaj kruelaj estoj homecas kaj ĉu indas ilin savi de asteroido minacanta inundi la bluan planedon. Emme, kiu sentas simpation al la teranoj kaj jam kontaktis ilin, atingas de la gobestroj la permeson averti pacaman tribon de la tero pri la minaco. Emme, flugtelere descendas sur la Teron kaj sciigas Utnoan pri la rimedo saviĝi, nome, la fama arkeo..."



POEMO DE UTNOA.

Naŭton mi himnos kaj universe faman arkeon,
kiuj elsavis vivon el tutplaneda diluvo.
Multon li trasuferis dum ĉarpentado de ŝipo,
hezitojn kaj ĉagrenojn daŭrajn fortbruste li venkis,
ĝis ondoj urbojn kovris kaj tutan teron inunde.
Homoj kaj bestoj en ŝlimfundo fordrone pereis.

Ĉiela Muzo, rakontu nun pri l' veraj eventoj
kiam elŝvelis maroj kaj la kaoso tumultis.
Ĉu ĝi fatalis nepra aŭ oni povis eviti?
Ĉu kataklismon mondan diaĵo pune provokus
pro flama venĝdeziro kontraŭ milkrima genero?
El altoj alparolu, ĉion klarigu volonte.

Kiam tendumis Uttu kun sia tribo nomada
en la Ŝinara lando, ĉe la Puratta rivero,
li suprengrimpis monton dum la matena krepusko.
Tie li tute solis rememorante la faktojn
praajn de sia gento, kiam subite li aŭdis,
ke jen el nordo blovas obtuza vento susura
kaj li ekvidis brilan stelon el tiu direkto,
pli brilan ol Iŝtaro, kiu ĉiele majestas.
Sed jen ĝi ekmoviĝas kaj fulmovoje rapidas
tra l' firmamento blua. Super Utnoa zenite
ĝi nun similis nubo kun mil nuancoj irizaj.
La nubo malleviĝis kaj ŝvebis super la arboj.
Per pluvo de fajreroj, ĝi kovris ronde la zonan.

Preter l' unua miro, li nun observi kapablis,
ke ĝi aspektas kvazaŭ kupola domo fluganta,
kun muroj el arĝento aŭ lazurŝtono polura.
Ĝi surterigis antaŭ li: laŭ hufaro de bovo
impresis ĝiaj plandoj, kiuj en grundon eniĝis.
Ĉe ties ambaŭ flankoj fenestroj rondaj abundis

similaj je okuloj alrigardantaj enigme.
Li tuj ekvidis buntan brilon ekstere kaj ene
kiel la ĉielarko post la pluvema vetero.
Jen pordo nun ekbuŝis sur ties mezo brilanta,
ŝajne fandiĝis muro kaj aperturo magie
formiĝis. Ŝtupareto luma elglite subiris
ĝishume dum ĉe l' pordo sin montris iu figuro,
kies aspekto estis kiel la bildo de homo.
La lumo lin blindumis, mistera vento zefiris
blovate de l' rondulo; pro trankviligaj effluvoj
surgrunden Uttu svenis kvazaŭ li falus abismen
kaj perdis la konscion antaŭ la bildo venanta.
Samkiel blanka urso por letargio kuŝiĝas
profunde en kaverno aŭ en fendajo de roko,
post kiam dumaŭtune ĝi grasnutriĝis abunde,
por povi pretervivi dum la frostego polusa.
Aŭ kiel jakareo dum la Afrika kacimbo (1)
sub koton enteriĝas, monatojn ŝirme tradormi
en la viskoza ŝlimo de sekiĝinta rivero
aŭ de multherba lago, por ne enrampi la silvojn,
simile Uttu svenis sur la herbaro de Beher,
vidinte fajroĉaron alproksimiĝi tra nuboj.
Tiam eklaŭtis voĉo, kiu en cerbo resonis:
-Ekstaru, ho Utnoa, ĉar mi parolos anonce!

Li estis Emme, ano de la popolo de Goba,
kiu tra spaco venis el sunsistemo Iboo.
Kiam eksplodis konstelacia supernovao
Nugu, ilia praa astro detruie glutiĝis
flame. Antaŭvidite de sciencistoj iliaj,
konscie, ke nenio kroma evite fareblas,
Gobanoj ekkonstruis gigantajn spackoloniojn
ĉirkaŭ la hejmplanedo kaj tiujn oni provizis
per nepraj materioj, rimedoj kaj per selektaj
faŭno kaj flaŭro propraj. La kolonioj egalaj
estis cilindroformaj, je kvardek tri kilometroj
longaj, kun radiuso je kvarmil metroj. Ilia
ŝelo konsistis nur el dura, travida metalo
izuo. Kaj ekstere, je ĉirkaŭ du kilometroj,
spguloj orienteblaj, larĝaj, konkave triopis,


kiuj reflektis enen la stelan lumon Iboan
prilumi la internan geografion unikan.

Nur la longeco de la poemo kaj la spacomanko de nia revuo baras al ni la
plezuron publikigi kompletan ĉi tiun belan poemon...

Nian gratulon al la talenta poeto Abel Montagut. Dankon.

La Redakcio

(1)kacimbo: seka kaj malvarma sezono.



Recenzoj

Meznokto metropola, de Krys Ungar; Antwerpen,
Flandra Esperanto-Ligo, 1991, Serio "Stafeto", n-
ro 14, 111 p., 290 BEF.

Frاندema leganto de Esperantaj versoj lernas
iom post iom, ke ne ĉio en la kampo de nia poezio hele brilas. Tial, ioma
malvido, ioma skeptikemo bonvenas antaŭ ol eklegi novajn poemarojn: ĉu ree
peza stilo, teda vortotreno, mallerta tekniko kaj misgustaj versoj? Ĉu denove
plumpe dehakitaj prozaĵoj sub aspekto de poemoj? Nur tre escepte renkonteblas
elstara verko de same eminenta poezia individueco, kia estas **Meznokto
metropola** de Krys Ungar: jen poemkolekto unutire legebla, kiu poiome kaj
neeviteble katenas la leganton per kreskanta entuziasmo. Ĉu trous diri, ke ĉi
verko altrangas en nia moderna poezio tuj post **La turoj de l' ĉefurbo**?

Plej ĝueblas en **Meznokto metropola** la kelkaj ampoemoj, forme diamantaj
kaj ŝire sinceraj. Tamen, la pliparton el la verko karakterizas preskaŭobseda
okupiĝo pri sociaj problemoj, kun evidenta naŭzo kontraŭ ĉia maljusto kaj,
malgraŭ la dekomenca kvazaŭmoto:

"(...) Kontraŭ l' aksiomoj
de l' teknokratoj kaj de l' borsbordelo
eksonu nia kant' insurekcia"

La tuta libro despartone pesimismas.

La lingvaĵo de la pola aŭtorino montriĝas plastika, supla kaj rafinita, kvankam foje iom troema al kunmeto -ekstremekzemple: "mondkomerckonspiroj"- kaj malgraŭ la fakto, ke ĉe nure-dure sociaj temoj, la kvalito blinde desupras pro la probabla hastemo forĵeti la galon. Tio ĉi certe ne malhelpas eltrovi perfektajn poemojn kun draste taŭgaj bildoj kaj metaforoj: "Fatrasas ĉio", "frontas sorton plenvizaĝe", "balonoj en bunta arpeĝo", "kiam koro nur inertas/ dum korpo mimas en glacia muto", "Edzinoj idĉenitaj" ...aŭ elegantan, surprizetan uzon de mal-: "jam malverdas/ iama trifoli' al nigra trefo", "Anstataŭ bisoj, malaplaŭd' kresĉendas", "dum pulse en fervojaj suboj/ la formikaro malripozas".

Graciplenaj, vibraj aliteracioj ne povas ne sugesti nian unikan Tárkony, fojfoje kvazaŭ ni tenus enmane la poemkolekton de nia granda intimisto:

"Verdveluro-ombre, susurŝvebe
l' arbaro vibris en animoj mondfremdaj,
kiuj pro kompat', per provoj pentraj,
versaj, tonaj, dividis savocelo
vizion kun la mondo malespera."

Krome, kiel ne rekoni Tárkony en Aserte? Kiel ne rekoni Auld en Februaro kaj en Nataŝa? Kiel ne rekoni do Boulton -kaj ties virinan prismontra la tuta verko?

Evidentas, ke Ungar bone konas Esperantan beletron kaj funde ĉerpis el ĝi por akiri poetan maturecon. Meznokto metropola indas sidi sur la bretoj de ĉiu postulema versamanto kaj espereble la aŭtorino plu fruktivas per eĉ pli bona(j) verko(j). Ĉu estonte? Jes, mi petas.

Menciindas fine la libro mem: la ekstera aspekto elegantas per sia rekta simpleco kaj la litertipoj perfekte taŭgas por poezio. Pli da tiaj libroj, FEL!

Antonio Valén


N. de la R.- Tiu ĉi Recenzo estis verkita de samideano Valén por eventuala publikigo en "Boletín" kaj "Kataluna Esperantisto".

«FUNDACION ESPERANTO»

KULTURA POLITIKO

«FUNDACION ESPERANTO» estas kultura institucio kaj ĝia ĝisnuna agado, grave limigita de la disponeblaj monrimedoj, precipe disvolviĝis pere de Internaciaj Literaturaj Konkursoj kaj plurfoja premio de ies esperanta agado.

La plenumo de ajna kultura agadplano eblas nur sub la ŝirmo de solida financa bazo. Tial «FUNDACION ESPERANTO» nuntempe malmulton povas fari ĉar monrimedoj mankas al ĝi. Ĉiaokaze «FUNDACION ESPERANTO», kiel ajna kultura organizo, devas adapti sian agadon al la eblecoj de siaj financoj.



Niaj ambicioj pri kultura agado grandas, kaj por la plenumo de tiuj planoj necesas serĉi, trovi kaj krei ampleksan financon subtenon.

Sur la pado de la ĝisnuna agado, «FUNDACION ESPERANTO» devus daŭre kunvoki ĉiujare literaturajn konkursojn, prefere kun atento al originalaj verkoj el plej variaj temoj — novaj mecenatoj povus sugesti aliajn temojn — kaj ĝi devus ankaŭ kompili statistikojn rilate al la nombro, sekso kaj aĝo de la partoprenantoj, ilia laŭlanda disdivido, lingva kaj kultura kvalito, la diskonigo de la konkursoj, kaj eventuale aliaj.

Por efektivigo de pli ambiciaj agadplanoj, «FUNDACION ESPERANTO» devas nepre posedi propran ejon kie disvolvi plej gravajn kulturajn iniciatojn. Laŭ nia koncepto, tiu ejo estus moderna kulturdomo aŭ viva muzeo. Do, ĝi konsistus el ekspoziciejo, konferencejo, kursejo, publika biblioteko kaj arĥivo. Tio signifas ke ĝi devus esti kulturcentro de la hispana esperanto-komunumo kaj samtempe ĝenerala Centro por Dokumentado kaj Informado.

La ekspoziciejo estu loko kie montriĝu ne konstanta ekspozicio. Do, aranĝita laŭ la moderna koncepto de tiuj ejoj, ĝi servu por montri, diversmaniere kaj per

varia materialo, la esperantan kulturon per minimume unu-du malsamaj ekspozicioj ĉiujare.

Kompreneble, nuntempe ne eblas plani kulturcentron sen konferencejo. Tie okazu prefere ne konferencoj pri Esperanto, sed diverstemaj konferencoj en Esperanto. Tiusence oni devus okazigi ĉiujare plurajn konferencojn pri temoj aktualaj aŭ esperantaj. Lige al tiuj konferencoj oni devus starigi kursejon kie didaktike kaj pedagogie plibonigi la nivelon de niaj instruistoj kaj aranĝi rapidkursojn. Normalaj kursoj estu afero de la esperantaj societoj.

Ĉiu kulturdomo grave zorgas la ekziston de publika biblioteko, ankaŭ ni devas ĝin havi kaj prizorgi. Tiu biblioteko devus enteni kaj esperantan kolekton kaj materialon en naciaj lingvoj, precipe rilate al informado kaj lernado.

Funkciigi arĥivon estas nepra devo de ĉia organizo, sed ja «FUNDACION ESPERANTO» povus havi tie valoran materialon, kiel, ekzemple, tiun de la konkursoj.

Kulturaj streboj devas ankaŭ pritrakti ian eldonan klopodon. Kvankam dezirindus pliaj gravaj eldonoj kiel *Don Kihoto*, oni ja devus priatenti la merkatajn eblecojn rilate al eldonkavanto. Tiusence, fleginda agadkampo ŝajnas la kolekto *Hispana Literaturo*. Fakte, ĉi serio devus daŭre efiki kiel stimulo ĉe niaj beletraj tradukistoj, dum samtempe ĝi pli kaj plu provizos la movadon per subvencioj, kiuj, se konvene administrataj, alportos ne nur iom pli da kapitalo, sed ankaŭ prestiĝon ĉe la ekstera publiko.

Interesa, el nia vidpunkto, kaj lige al menciita Centro por Dokumentado kaj Informado, estas la aperigo de serio de dokumentoj kiuj estu helpiloj por movadaj agadoj. Fakte jam ekzistas plano pri tiuj dokumentoj, do oni devas realigi iom post iom tiun ideon, tiel ke spertaj aktivuloj informu kaj diskonigu siajn konojn al aliaj. Denove, ni deziras atentigi pri la neceso zorge antaŭkalkuli la eldonkvantojn, tiel ke la stokoj ne kaŭzu problemojn.

Tamen, la kultura agado ne devas esti limigita al tiu centro. La disvastigo de Esperanto estas agadkampo kie «FUNDACION ESPERANTO» devus kunlabori kun HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO. Tiusence, «FUNDACION ESPERANTO» povus helpi rilate al aranĝado de rapidkursoj kaj varba materialo. Ĉi lasta estas esence grava. Bedaŭrinde, ni bezonus statistikon pri nunaj bezonoj, tiel ke oni planu la estontan agadon kaj eventualan eldonon de materialo.

En la kadro de la Naciaj Kongresoj, «FUNDACION ESPERANTO» devus aranĝi kunsidon, por plej vaste informi kaj ankaŭ por kaptado de realigeblaj ideoj.

La vorto kunlaboro estas esence grava. «FUNDACION ESPERANTO» devas kunlabori kun HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO por la realigo de komuna kultura programo de la hispana movado kaj ankaŭ kun aliaj movadaj aŭ ekstermovadaj institucioj por la plenumo de projektoj.



Celo de «FUNDACION ESPERANTO» devas esti la atingo de modernaj lernomaterialo kaj vortaroj kaj ree ĝia kunlaboro en ilia kompilado devas esti kiel eble plej signifa.

Nu, resume, la kultura agado de «FUNDACION ESPERANTO» ĉefe devas esti direktita al disvastigo de Esperanto kaj ties kulturo, kaj ankaŭ al la peresperanta laboro. En tiu vasta agadkampo, «FUNDACION ESPERANTO» devas kiel eble plej vaste agi, sed ne eblas realigi programon, sen solida financa bazo kaj homa kunlaboro.

Juan Azcúenaga kaj Miguel Gutierrez

★ Samideano Valmet Jing Wei. Valmet-Xian Paper Machinery Co.Ltd. n° 4. Wei Yang Road; CN-710086, XIAN. Ĉinio. deziras kontakti kun geesperantistoj praktikantaj jagon, kun la celo fondi Esperantistan Organizon pri Jogo. Respondo garantiata.

★ 19-jara studentino pri muziko kaj sporto. F-ino Bai Ildikó, H-2364 OCSA. Némedi ut. 68. Hungario.

★ Geesperantistoj de ukraina klubo dez. kor. kun hispanoj.

Adreso: Esperanta Klubo "SVEHA"; P.Box-50; SHOSTKA-7. Sumska obl. UKRAINIO.

deziras

korespondi

★ Ankaŭ deziras korespondi Esperanta Rondeto V.S.; ul.Voronezská-38.SPTV-19; SHOSTKA. Sumska obl. UKRAINIO.

★ 47-jara inĝeniero-agronomo dez. kor. pri

diversaj temoj. Adreso: S-ro Ernő Nagy; Liliom u 12/B. DOMASZEK. Hungario.

★ S-ino. Zdena Mócova; Prazská, 621; 472 ol-DOSKY. Ĉekoslovakio, deziras korespondi kun hispanoj. Ŝin interesas kulturo, arto kaj hispana vivmaniero.

★ Dana urbo Naestved, 90 km. sude de Kopenhago. idilia pejzaĝo. Mendu broŝuron ĉe Turisma Oficejo. Kobmagergade 20 A. DK-4700-Naestved.

Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO
Aperanta de 1949

Ĉefredaktoro: Miguel Gutiérrez
Adúriz; Los Coterros 1-C, 2-I; ES-39600
Muriedas; Cantabria; liven@nexo.es
Kunlaborantoj: Salvador Gumá, Miguel Fernández, Vicente Hernández, Andrés Martín, Luis Serrano, Antonio Valén, Antonio Marco.

Noto: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro. La redaktisto rajtas rifuzi ne petitajn artikolojn.

Hispana Esperanto-Federacio

Rodríguez San Pedro 13, 3º, 7;
ES-28015 Madrid;
Tel. +faksilo: +34.(9)1.446.80.79
Konto: 14.011.966, Caja Postal
admin@esperanto-es.org
www.esperanto-es.org

Estraro

Prezidanto: Miguel A. Sancho;
Vicprezidanto: José M. Galofré;
Sekretario: Manuel Parra;
Kasisto: Pedro Garrote;
Vicsekretario: Marcos Cruz;
Voĉdonantoj:
Luis Hernández,
Augusto Casquero,
Miguel Gutiérrez.

Enhavo

Invito al la Kongreso (Miguel A. Sancho)	2
Estrar-kunsido	3
1000 Donkiĥotoj	4
Jarraporto de la HEF-Estraro .	5
HEF kaj UNESKO (Manolo Parra)	7
HEF: Balance de Situación ...	8
Libroservo dum 1997	10
Donacoj	11
Listo de novaj membroj	11
Survoje al la 57a Hk (Luis Hernández)	12
Programo de la 57a HK	13
Alvoko al ĜK de HEF	13
Niaj Grupoj kaj Asocioj	14
Premio por UEA-peranto ...	21
ILEI	22
Ĉirkaŭ la mondo	23
TEJO-seminario en Vitoria ..	24
Kongresa informilo	25
Premio Klara Silbernik	26
Emas korespondi	27
Jen aperis	27
Invitoj	28
Lingva angulo (A. Valén)	29
La jaro de Lorca en esperanto (Miguel Fernández)	31
Niko Sarmjento (Valentin Soriano)	32
Olafo	32
Anoncoj	6, 7, 21, 28